

Heinrich Heine,  
The Lorelei

*tradukita de Mark Twain*

*An ancient legend of the  
Rhine*

I cannot divine what it  
meaneth,  
This haunting nameless  
pain:  
A tale of the bygone ages  
Keeps brooding through  
my brain:

The faint air cools in the  
gloaming,  
And peaceful flows the  
Rhine,  
The thirsty summits are  
drinking  
The sunset's flooding wi-  
ne;

The loveliest maiden is  
sitting  
High-throned in yon blue  
air,  
Her golden jewels are shi-  
ning,  
She combs her golden  
hair;

She combs with comb that  
is golden,  
And sings a weird refrain  
That steps in a deadly  
enchantment  
The listener's ravished  
brain:

...

Heinrich Heine,  
Lorelej'

*tradukita de Leopold  
Elb*

*Tiu traduko estas poste  
iom modifita de aliu-  
loj, ne estas la origina  
traduk-versio de Leo-  
pold Elb.*

Ne scias mi, kial mi  
estas  
Malgaja en la kor'.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia me-  
mor'.

Vespero jam ekmal-  
heliĝas,  
Fluadas la Rejn' en  
trankvil',  
La supro de l' monto  
lumiĝas  
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen  
tronas  
Kun ora juvelar',  
La belan vizaĝon  
kronas  
Mirinde la ora ha-  
rar'.

Ŝi uzas kombilon el  
oro  
Kaj dume kantas ŝi.  
Mirige tuŝas al koro  
Sorĉiga la melodi'.

...

Heinrich Heine,  
Lorelej

*tradukita de Ludwig  
Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial sub-  
ita  
malgaj' en la koro na-  
skiĝis;  
el tempo jam enteri-  
gita  
legendo al mi revi-  
viĝis.

Jam malvarmetiĝas l'  
aero,  
la Rejno mallaŭte ba-  
bilas,  
per oro de l'sun' en  
vespero  
la supro de l' monto  
rebrilas.

Plej belan knabinon  
mi vidas:  
en ora ornamo bri-  
lante,  
sur supro de l' monto  
ŝi sidas,  
la harojn mistere  
kombante.

La oran kombilon ŝi  
movas  
kaj kantas tra l' pura  
aero,  
kaj forto mirinda sin  
trovas  
en tiu ĉi kant' de  
l'vespero.

...

Heinrich Heine,  
Lorelay

*tradukita de Hans-  
Georg Kaiser*

Min kaptas malgaj'  
en la koro,  
pro kio tia trist'?  
Fabel' el antikva foro  
ne lasas de mi kun  
persist'.

Aere fridetas, trank-  
vilas,  
malhelas jam la Re-  
jn'.

La monto surpinte  
brilas  
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,  
jen supre por ador';  
la ora ornamo ridas;  
ŝi kombas harojn el  
or'.

Ŝi kombas per ora  
kombilo  
kaj kantas kun pasi';  
mirigas min la elbrilo  
kaj forto de l' melodi'.

...

The doomed in his drifting shallow, Is tranced with the sad sweet tone, He sees not the yawning breakers, He sees but the maid alone:	Kaj sopiregon eksentas Ŝipisto dum sia vetur'; Rifaron li ne priaten- tas, Al monto rigardas li nur.	Ŝipet' iras sur la rivero, ŝipisto ekstremis de l' kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kanto.	Ŝipisto ŝipeton gvidas, lin kaptas ve' de ekzalt'. Li ja la rifojn ne vidas', li vidas nur supren sen halt'.
--	--	--	---

The pitiless billwos engulf him!- So perish sailor and bark; And this, with her baleful singing, Is the Lorelei's gruesome work.	Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat', Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad'.	Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l' akvoturnado; ĝin Lorelej' faris kruela, per sia mirinda kantado.	Mi kredas, ke ondoj tiras la ŝipon funden de l' Rejn'; kaj tio de l' kant' eliras de Lorelaj-siren'.
---	---	--	---

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Anglan de Mark Twain.*

Arg-2-11 (2003-10-13 04:42:59)

*A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leibzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880 (rf. <http://www.loreley.com/loreley/marctwai.htm>)*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

*La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

*Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mu.ru/Kolekto/Lorelej.html>.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)